Go-Amiko

Informilo de
Japana Esperantista Go-Asocio
N-ro 165, Aŭgusto 2022

Skulptaĵo ĉe la ŝintooisma templo Ido en Takasaki, Gunma

日本エスペラント大会で囲碁分科会に参加を！

日時：２日目、９月 24 日（土）9:30～10:00
内容：活動方針、囲碁対局

第 109 回日本エスペラント大会　八王子市
2022 年 **9 月 23 日**（金・祝日）～**25 日**（日）

今年の日本大会は上記期間、JR 中央線八王子駅北口すぐの向かいのビル内 11F、12F を占める**八王子市学園都市センター**を会場にオンライン参加を併用して行ないます。

参加申込み期日　９月１０日（土）

大会記念品　「島崎敏一・国際文通物語　1930 年代を生きたエスペランチストたち」を大会記念品とします。世界大恐慌（1929 年）から、ヨーロッパでヒトラーが台頭する第 2 次世界大戦前まで、島崎敏一氏が前橋商業学校在学中から召集されるまでの 10 年間に世界中のエスペランチストと文通をした絵葉書・手紙 300 通から堀泰雄さんが編集中です。

La 109a Japana Esperanto-kongreso

Dato : La 23a de septembro- la 25a de septembro 2022
Loko : Haĉiooĵi
Limdato de aliĝo: la 10a de septembro

Ni havos kunsidon de Japana Esperantista Go-Asocio, en kiu ni decidos la agadplanon por 2022-2023. Poste ni ludos aŭ instruos ĝo-on.

囲碁の格言 Saĝaj vortoj pri Go-ludo

囲碁の格言を覚えておいて、場面場面でそれを思い出すと、良いヒントにもなるし、冷静になります。Saĝaj vortoj pri Go-ludo estas utilaj por venki.

アタリ、アタリはヘボ碁の見本

Minaci kaj plu minaci estas malbona ekzemplo de malforteco.

* Sinsekvaj minacadoj estas facilaj kaj agrablaj, sed tio nur fortigas la kontraŭulajn ŝtonojn.

厚みに近寄るな

Ne alproksimiĝu al forta ŝtonaro.

* Viaj ŝtonoj proksimaj al la forta ŝtonaro estos facile atakataj.

厚みを地にするな

Ne provu fari teritorion apud via forta ŝtonaro.

* Uzu la fortan ŝtonaron por atakado.

一にアキ隅、二にシマリ、三にヒラキ

Unue metu ŝtonon ĉe libera angulo, due gardu tiun ŝtonon, kaj trie etendu la teritorion.

一間トビに悪手なし

Unupunkta salto neniam estas malbona meto.

* Dank'al unupunktaj saltoj viaj ŝtonoj neniam estos fortranĉitaj.

石飛んでその碁に勝たず

Se via metota ŝtono saltos ekter la tabulon, vi certe malvenkos.

* Ĉiam estu trankvila. Se vi estas tiel ekscitita, vi neniam venkos.

一石に負けなし

Unuiĝintaj ŝtonaroj kondukas vin al venko.

* Estas tre grave ligi ŝtonojn.

一方石に死になし

Unu malforta ŝtonaro ne estos mortigita.

* Se estas pluraj malfortaj ŝtonaroj, estas malfacile protekti ĉiujn.

Meditoj 6

verkita de Sakurai Nobuo

91. Ĉar ekzistas tiaj kirurgoj, kiaj ŝatas fari truojn al la homaj korpoj, ni devas singarde eviti tiajn.

92. La laborantoj deĵorantaj ĉe la volontulaj organizoj havas samtempe oferemon kaj gajnemon. La sinteno al la laboro dependas de tio, kiom grade ili pretas sindoni.

93. Esti geedzoj dum multaj jaroj senkonsciigas la ekziston de la unu de la alia, kvazaŭ ni ne konscias, ke ni vivas en la aero.

94. Absolute mankas la amo al la viroj, kiuj postsekvas virinojn por satigi sian malnoblan deziron.

95. Ĉu mi eraras, se mi asertas, ke estas memkontraŭo, ke la komputero regata per la programo, kiun instrukcias la homa cerbo, superas la kapablon de la homa cerbo?

96. Esperanto ŝajnas malsukcesinta kiel la pacigilo, sed estas sukcesanta kiel oportuna komunikilo.

97. Por vivi sincere estas nemankeblaj la memkonscio kaj la introspekto.

98. La karakteroj de la rasoj formiĝas depende de la naturo de la loĝloko.

99. La vera literaturo estas la krio el la fundo de'l animo.

100. La beleco portas feliĉon, sed aroganti la belecon portas malfeliĉon.

El ”Ludu Goon VIII” turniro sur OGS-2

“Ludu Goon VIII” turniro en grupejo “Esperantejo” sur OGS Go-servejo (https://online-go.com/group/137) daŭras ĉirkaŭ unu kaj duon jaro. Nun prezentos analizon por tre frua etapo de unu partio el la turniro, ludita inter mi kaj ne-esperantista partoprenanto. Do ne skribas la nomon de mia kontraŭulo.



Se vi havas konekton al la inter-reto, vi povas postludi la ludon ĉe jena ligilo; https://online-go.com/game/43533730

Nigra ludanto havas 2a KJUU (級) rangon en OGS, kaj eraris kiam elekti la taktikon en la MalSupra-Dekstra angulo. Post blanka meto 20a (b20), Nigro perdis ambaŭ ŝtonarojn, ĉe la angulo kaj en la MalSupro de la Dekstra rando.

Por analizo mi ankoraŭ uzadas Arte-faritan Intelekton “Leela Zero”, kaj la utiligilan programon “Lizzie”.



Oni ne devas forgesi, ke “Leela Zero” ne povas legi la ‘ŝtuparon’(SITYOU).**

Do, la analizoj devus esti ne justaj.

Ni revenu al la unuaj metoj.

Leela Zero kalkulas, ke avantaĝe por ambaŭ Blanko kaj Nigro estas ŝtonmeti sur iun anglon, ne en centron.

Laŭ Leela Zero, eĉ post la kuruc-tranĉo en la centro, ankoraŭ gravaj estas anguloj, kaj post la okupoj de ĉiuj anguloj ŝtonmetu en centron. Sed ni amatoroj ne prizorgu pri malgranda diferenco de procento por venki, kaj libere ŝtonmetu laŭ nia volo aŭ ŝato.



Laŭ Leela Zero, plej gravaj estas la unuaj metoj al anguloj, sekve gravaj estas la centraj ŝtonoj. Kaj post la okupo de vakaj anguloj kaj la sekurigo de centraj ŝtonoj, oni invadu la teritorion sub la “stelo”j, nome ŝtonmetu sur la tri-tri punkton, kiel montrita en la maldekstra diagramo, b5 en la MalSupra-MalDekstra angulo.



Bonvole revidu la registraĵon en la unua paĝo.

Anstataŭ la Nigra ĉevala ekbatalo (KO-GEIMA GAKARI), n11 (sur R-6), Leela Zero sugestas la sin-etendo (NOBI) sur L-9.

Vidu la maldekstran diagramon. Post Nigra sekurigo de centra ŝtono, plej grave por Blanko estas invadi la MalSupra-MalDekstra angulo, laŭ Leela Zero.



Bonvole revidu la registraĵon en la unua paĝo.

Anstataŭ la Blanka ambaŭflanka atako (HASAMI), b12 (sur Q-9), Leela Zero ankoraŭ sugestas la invadon al la MalSupra-MalDekstra angulo.

Vidu la maldekstran diagramon. Post la procedo ĉi tie, Blanko sekve invadu la Supran-Dekstran angulon kiel b6.

Kiel teritorion-amema estas AI-oj!

Interese estas ke Leela Zero elektas fortigon de ne-kaptota ŝtono per n17 kaj lasi Blankon kapti unu ŝtonon per b18. Kaj tio estas pli grava ol respondo en Supra-Dekstra angulo!**



Kontraŭ la Blanka ambaŭflanka atako, Nigro devus interŝanĝi la ek-batalantan ŝtonon kaj la angulan teritorion, ŝtonmetante sur la tri-tri punkton, n2.

Interese estas, ke Leela Zero montras alian varion, kiam plue esploras la procedon post la suben-bato (SITA-HANE), b13. Vidu la sekvan paĝon.



Post longtempa kalkulado, Leela Zero montras la varion maldekstran.

Nigro ne forlasas la ekbatalantan ŝtonon ĉe la MalSupra-Dekstra angulo, kaj sin-vivigas farante du okulojn.

Respondante Nigrajn ŝtonmetojn, Blanko faras grandan kvazaŭteritorion en dekstra centra kampo.

Leela Zero taksas, ke la Supra-MalDekstra angulo kaj la supra rando estas pli gravaj ol la Supra-Dekstra angulo, kaj forlasante Blankan ambaŭflankan atakon, b20, singardas la Supra-MalDekstran angulon, per n21.



Bonvole revidu la registraĵon en la unua paĝo.

Anstataŭ la Blanka diagonalen-tuŝ-meto (KOSUMI-TUKE), b12 sur R-5, Leela Zero sugestas du-punkte salutantan respondon kiel montrita en la maldekstra diagramo.

Cetere, la Nigra ludanto estas ne-esperantista kataluno, sed tuj komprenis miajn skribojn enperantajn kaj reskribis en esperanto eble kun helpo de GOOGLE traduko.

Go-ekzercaro por Komencantoj (28)

Per kiu meto Nigro povas sin-ligi, kaptante blankan ŝtonon?



Respondo A: malbona



Nigro provas kapti blankan unu ŝtonon per ‘ŝtuparo’ ekde N-1.

Tamen kiam blanko eskapas kiel B-6, nigra unu ŝtono estas minacita kaj la ŝtuparo malsukcesas.

Respondo B: bona



Nigro devus elekti alian taktikon nomatan ‘pordo’ (GETA).

Blanko neniel povas eskapi.

La problemo 279-a

Nigro havas meton.



La problemo 280-a

Nigro havas meton.



La solvo 277-a

Nigro povas mortigi la blankon.

Fig. 1-a: Sukceso. Ĉu vi trovis la esencan punton, N-1? Kontraŭ B-2, ree okupas la gravan punton, N-3, kaj finas per N-5 kaj N-7. Ĉi tiam alternativaj estas punktoj ‘a’ kaj ‘b’.

Fig. 2-a: Malsukceso. La plej esencan punkton okupas Blanko per B-2. Alternativaj estas punktojn ‘a’ kaj ‘b’, kiuj faras okulon respektive ĉe punkton ‘c’ aŭ ‘d’.



Fig. 1-a



Fig. 2-a

La solvo 278-a

Nigro povas mortigi la blankon.

Fig. 1-a: Sukceso. Vi, kiu povas imagi la formon, oferi du ŝtonojn estas forta. Efektiviĝas minaco per N-3. Finas la kojnuma meto N-5.
Ĉi tiam alternativaj estas punktoj ‘a’ kaj ‘b’, kiuj malebligas Blankon fari du okulojn.

Fig. 2-a: Malsukceso. Oni diras “Esenca estas metordo.”



Fig. 1-a



Fig. 2-a

(La problemoj estas cititaj el ĵurnalo “ASAHI SINBUN” 朝日新聞)

Apero de go-amiko Taĵima 4

碁仇・田島さんの出現（4）

ひょんなことから 10 歳年下の田島さんという人と出会って、彼は毎週火曜日に、私のところへ来て、囲碁の対局をすることになった。彼はなんと東京芸大大学院終了という経歴を持つ。芸大に入るような「天才」に出会ったのは、私の人生で初めてだ。

>>>

ようというわけだが、性格上、なかなか徹底しない。「取らない、というのに取るじゃないか」と文句を言われるので、最近は「取りには行かないが、取れるときは取る」と言うようにしている。もう一つ「捨てる」と宣言するのだが、これも難しい。その石で相手が分断できそうだと思うと、どうしても逃げて、相手の石を取りに行ってしまうのだ。そんなことで「私の方が棋力は上だ」と信じているのに負けてしまうので、その過信が禍なのかもしれない。

さて、対局中に、田島さんは、いろいろ話しだす。彼は離婚されて一人で住んでいる。息子は２人いるが、一人はアメリカにいて、アメリカ人の妻と子供がいる。もう一人は、中国に留学していたが今は日本に戻り、何かをしている。本人は画家で、画家の予備校で週に１度授業に行く以外は家で絵を描いているが、その絵は、毛筆で漢詩を書き、その上にまた黒いものを塗る「のり弁」みたいな作品である。とても売れそうにはないが、「売れるものを描くのでは芸術家ではない。描きたいものを描き、売れなくても仕方がない」と崇高な芸術家魂の持ち主である。チョウが好きで、「最近はアゲハも来ないですね」「セミが鳴かないですね」などと外を見ながら話しかける。そうそう、昨年からネコを飼いだした。名前はピーというので、ある人からは「英語ではおしっこのことだ」とバカにされている。しかし、このちょっと病身のピーちゃんのお陰で、家に帰っても話し相手がいるので「精神的にすごく良い」という。また週１回の私との囲碁対局も精神状態の改善にとても良いらしいが、逆に負けると落ち込むので、私が連続で勝つと、これまた困りものである。私が前半に勝勢になり、中盤から田島さんが逆転する、というパターンが良さそうだが、私もそうそう負けていられないので、なかなか難しい。

ま、なんだかんだと言いながら、私も楽しんで打っている。田島さんが来なければ、50 年前に買った桂の６寸盤も、床の間の隅で埃になっていただけだから、この碁盤が一番喜んでいるのかもしれない。

—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○

Japana Esperantista Go-Asocio (JEGA) 日本エスペランチスト囲碁協会
Esperantista Go-Ligo Internacia (EGLI) 世界エスペランチスト囲碁協会
UEA-konto: egli-f　　Retejo：　http://jega.shisyou.com/jega/index.html
Adreso：　2-13-3 Ootone, Maebaŝi, Gunma, Japanio, 371-0825, Japanio
Ĉe HORI Jasuo　３７１－０８２５　群馬県前橋市大利根町２-１３-３　堀泰雄方
retadreso: hori-zonto@r.water.sannet.ne.jp　電話：027-253-2524
Ĝirkonto: 郵便振替口座 00170-4-84859 日本エスペランチスト囲碁協会
525-0041 滋賀県草津市青地町 960-8　森均方